ISNN 0949-9830

# FORSTISTA INFORMILO

de INTERNACIA FORSTISTA RONDO ESPERANTLINGVA

Nr. 21 Eberswalde 1990-03-15

## 1. Pri nia terminologia kaj vortaro laboroj

### 1.1. La nuna stadio de la laboro

Ĝis nun ni eldonis la difinno- proponojn ĝis numero 1023 kaj la .1-version ĝis n-ro 0999.

### 1.2. Pri la preparo de la .2-versio

- Ĉar ni devis agadi ĝis nun laŭ alfabeta sinsekvo (vidu nian raporton en FI n-ro 17), ni nun devas provi, kiel la terminoj konvenas unu al alia en nocio-sistermoj. Tiutempe la membroj de la Malgranda Komisiono denove provas la termino-proponojn kadre de vortfamilioj, de vort"cluster" kaj de la Oxford-sistemo.
- Kiel aranĝo-sistermo por la terminaro ni ja proponis la Oxford- sistemo (vidu aldonon n-ro 4 de FI n-ro 20). Ĉu ĉiuj kunlaborantoj akceptis la proponitan ordo-sistemon? Ĝis nun ni ne eksciis eĥon.
- La teritoria valideco de apartaj fakvortoj estas anoncitaj per la mallongigo de landnomo laŭ signoj en la internacia aŭtotrafiko. Estonte ni uzos el la "International Standard ISO 3166" (1988) la "Alpha- 3 code" n. La estontaj ŝanĝoj ekz. de A al AUT, de CH al CHE, de NZ al NZE estos facile kompreneblaj.
- Ĝis nun en niaj tekstoj (en la enhavoj de la slipoj) ciferoj estas permesitaj ekster en la unua linio nur kiel kodociferoj. La malkodad-programo enhavos la estontan eblecon, distingi inter normala cifero kaj kodocifero, se post cifero sekvas ne litero kiel ĉe la kodo. Do, ni ellasos la neceson skribi per literoj laŭnombran indikon de dimensio.
- Car en terminologio ĉiu termino devas anoncata en la singulara formo – se tiu ĉi nocio ekzistas – ni ŝanĝos la formon sub n-ro 0410.
- Ni kunfandis la sekvontajn nocio-numerojn: 1019 al 0326, 0882 al 0501. La liberigitajn numerojn ni rezervis por aldonaj nocioj.

### 1.3. Novaj kunlaborantoj

Ni povis varbi pliajn kunlaborantojn (ne-espreantistojn):
Por la hispanaj ekvivalentoj:
Ing. Huberto GRA RIOS, Calle 174 No. 1723 e/ . 17B y 17C,
Sibonej, Playa/ Kubo
Por la slovakaj terminoj:
BLAŠKO, Luboš, H. Beimler- Str. 42, Eberswalde- Finow, DDR- 130

K. –H. Simon

## 2. Pri kunlaboro inter IFRE kaj AIS

Nia rondo post nun jaro povos festi la dekjaran ”fondojubileon”, kvankam iu oficiala fondo de IFRE neniam okazis. Do, ni festu la jubileon, sed antaŭe ni oficialigu nian rondon. Pro tio mi proponas renkontiĝon (IFRE- kunvenon aú eĉ kongreson) de ĉiuj IFREanoj ĉijare. Kiel renkontiĝejon mi proponas Nordorientan Filion de Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS), ĉe la Politechnika Białosticka (Teknika Universitato) en Białystok, dum la 8a Sennacieca Universitata Sesio (SUS) la 15an ĝis 25a de septembro 1990. Mi partoprenis la Provsesion por SUS 8 (preparsesio por SUS 8) en Białystok, en februaro ĉijare. Dum la provsesio okazis universitataj kursoj (mi prelegis pri arbarmortado kadre de kurso pri ekologio), prelegoj de AISanoj kaj de docentoj kaj profesoroj de Politechniko, ekzamenoj por adapto aŭ origina atingo de akademia grado, sed plej grave estis la kontaktoj kun invititaj reprezentantoj de multaj polaj altlernejoj, cele estonta kunlaboro, uzanta Esperanton.
La sesio estis impona ekzemplo de la praktika apliko de lingvo internacia (-etna) en scienco kaj universitata edukado. Por ni arbaristoj/ forstistoj gravas la fakto, ke la sesio havis ĉefan temon – ekologio. En la Politechnika Białostocka ekzistas fakultato-instituto pri vivmedio kaj ĝuste kun ĝi ni povus kunlabori. Tiu instituto kunlaboras kun forstaj esploristitutoj kaj administracioj, ekzemple tiuj en la praarbaro Puszcza Białowieska (Białowieza). AIS konstruos en Białystok t. n. Akademidomon, en kiu okazados la ĉefaj okupoj de la AIS- Filio ”Protektado de la naturo kaj kulturo”. Mi opinias, ke ni IFREanoj serĉu ĉambron en tiu domo – hejmiĝu tie, kie nia kara lingvo naskiĝis. Ni partoprenu la SUS 8an kaj kadre de ĝi ni kunvenadu por pridiskuti niajn aferojn (terminologia agado, tradukado, faka verkado k.a.), sed ni ankaŭ kontribuu al la programo de SUS. Dum SUS 8 ni ekskursu al la proksima praarbaro en Białowieza. Mi jam starigis kontaktojn kun tie laborantaj kolegoj kaj koncerna docento de la Politechnika Białostocka (la docento komencis lerni Esperanton). Ĵus aperis mapo de la praarbaro, en kiu la klarigoj krom lingvo pola estas ankaŭ en lingvoj de AIS, do ankaŭ en Esperanto. La urbo Białostok estas ĉirkaŭata de alia praarbaro, kiu komenciĝas tuj malantaú la AIS-Filio. Ĉu ne sufiĉas la argumentoj por veni al Białostok septembre? Prospektojn pri AIS, la AIS-Akademidomo Białostok kaj la mapon de la praarbaro Puszcza Białowieska petu senkoste ĉe mi aŭ IFRE-sekretario Dr. Simon, Carl-v.- Ossietzkystr. 21, DDR- 1300 Eberswalde- Finow. Pliajn informojn pri la SUS 8 vi ricevos de:
MIEDZYNARODWA AKADEMIA NAUK (AIS); Politechnika Białostocka,
Ul. Wiesjska 45a, PL- 15- 351 Białostok
Sed nepre informu Dr. Simon aŭ min pri viaj intencoj kaj ideoj.

Johann- Andreas Pachter, dipl. forstinĝ.
Zum Kreutle 8, D- 7480 SIGMARINGEN 6

**Aldonaĵoj:**
N-ro 1: SIMON, K. –H.: Ĉu la laiko povas vivteni la arbaron?
N-ro 2: ULLRICH, I.: Kelkaj rimarkoj pri la politikaj eventoj en la GDR
N-ro 3: Decimal- klasifikado pri la forsta fako laŭ Oxford- sistemo p. 18 - 27

**Aldonaĵo 1 al FI N-ro. 21**

Prelego dum JEM en Leipzig je la 26a de julio 1989
SIMON, K.-H.

**Ĉu la laiko povas helpi por vivteni la arbaron ?**

Ankoraŭ antaŭ 20 jaroj mi estus respondinta al tiu demando per atentigo pri avizoj, kiujn oni elpendigis ĉe arbarorandoj:
Prevenlu arbarincendiojn! Kompreneble tio validas ankaŭ hodiaŭ. Sed ni ĉiuj scias, ke la problemoj koncerne la arbaron estas nuntempe pli multformaj. Extremaj meteorologiaj kondiĉoj kiel malseka neĝo, ŝtormo, sekeco kaj frosto, povas ege difekli arbarojn. Damaĝbestoj kiel bostrikoj, damaĝaj plantoj, kiel kelkaj fungoj, povas kaŭzi grandajn perdojn. En kelkaj regionoj estiĝas damaĝoj fare de tro multnombra provizo da ĉashufuloj.

Ĉiuj ĉi damaĝaj faktoroj, delonge konataj, estas pli konsiderindaj en iomete kadukiĝintaj arbaroj. Granda kvanto de niaj arbaroj en Mezeŭropo nun estas kadukiĝinta, kadukiĝinta fare de ŝarĝoj el la medio. Mortintaj arbaroj en Ercmontaro pruvas ekstremajn ŝarĝojn.
La moda vorto “Waldsterben” = arbarmortado cirkulas.

Ĉu tiu fenomeno tiom gravas ?
La arbaro estas vivkomunumo de plantoj kaj bestoj, varie karaklerizita laŭ tero, reliefo kaj klimato. La kompetentuloj parolas pri la arbarekosistermoj kaj klopodas reteni kolapson, katastrofon de tiuj sistemoj. Estas la mulspecaj efikoj, kiuj valorigas por ni tiujn apartajn ekosistemojn.

Arbaroj estas karkterizaj en nia mezeŭropa pejzaĝo kaj samtempe estas necesega parto de sana vivospaco. Ĝi estas hejmo por multspeciaj bestaro kaj plantaro. Ĝi preventas eroziajn damaĝojn de la grundo, reduktas inundojn kaj protektas en montaro kontraŭ lavangoj de neĝo kaj ŝtonoj. Ĝi produktas oksigenon, purigas la aeron kaj efikas regulige sur la klimato. Ĝia tero akumuladas relative multe da akvo kaj grarantias konstantan provizadon per eksterordinare pura trinkakvo, ĉar la arbaro garantias preskaŭ fermitan cirkuladon de nutrajsubstancoj, Ĝi reduktas la forton de vento, mallaŭtigas la intenson de bruo kaj estas grava ejo por la ripozo kaj intensa naturtravivajo de homoj. Kompreneble arbaro havas grandan ekonomian gravecon por liveri krudmaterialojn kiel ligno, rezino k. a. kaj donas al multaj homoj ejon por labori. Redukto aŭ perdo de tiuj efikoj de arbaroj tre malaltigus nian vivkvaliton.

Same kiel en multaj landoj, ankaŭ en GDR oni komencis ampleksan programon pri la esploro de arbardamaĝoj. La mekanismo de tiuj novspecaj arbardamaĝoj ne esrtas klarigita en ĉiuj detaloj. Unuanime oni kredas aerajn nociajn substancojn decidaj. Sulfur dioksido el elektraj kaj hejt-centraloj, el industrio kaj domhejtado estas implikitaj.
Kreskas ankaŭ la graveco de nitrogen-oksidoj, kiuj plejparte devenas el ellastuboj de veturiloj. Kune kun hidrogenaj karbidoj ili ŝanĝigas efike de sunenergio al foto-oksidantoj ekz. ozono. Tiuj ĉi estas fortaj plantaj kaj ĉelaj venenoj. Estas necese alkalkuli pezajn metalojn kaj el nia intensa agrikultura

produktado nitrogenajn kombinajojn. Ĉe komuna ekzisto de kelkaj nocaj substancoj, ili ne nur sumigas sed multobligas siajn damaĝefikojn.

La areaj poluciaĵoj parte sedimemtas sur pingloj kaj folioj – tial la forta filtra efiko de arbarroj – kaj pluvo forlavas ilin en la teron. Aliĝas ellavajoj de nulraj substancoj el pingloj kaj folioj kun detruitaj ĉelaj membranoj. Tial estiĝas krom la senpera damaĝefiko specifa venenigo de tero, kio damaĝas arbojn kaj la ĝis nun tre pura grunda akvo sub arbaroj. Eblis mencil nur kelkajn vidpunktojn el la diverseco de la interrilatoj inter la luta vivomedio kaj la arbar-ekosistemoj.

Kio estas hodiaŭ la ĉefa ĉenero por stabiligi niajn arbarojn? Tio estas la ŝparado de energio. La grandparton de nia energibezono oni kovras per forbruligo de fosiliaj energiportantoj en industrio, trafiko kaj mastrumaĵo. Krom la jam menciitaj damaĝantaj elflugasoj ankaŭ la estiĝanta karbondioksido kaŝas danĝerojn. Ĝi plifortigas la varmdoman efikon sur la Tero. Ĝenerala altiĝo de temperaturo sur la Tero plie malfortigus la stabilecon de niaj arbarekosistermoj. Do, la poliliko de ŝparado de energio kaj rimedoj kiel ĝi estas praktikita faro de la registraro de GDR dum kelkaj jaroj, meritas nian subtenon. Ankaŭ ŝparado de rimedoj kaj “Recyling” estas ŝparado de energio.

Plua vojo estas la evoluo kaj apliko de teknologioj, kiuj zorgeme traktas la vivomedion. Multekosta afero. Pro tio la uzo de rimedoj estas ligita kun la formo de la konkurado inter la du grandaj sociaj sistemoj. Aŭ sukcesos la politiko de dialogo, de paca kunekzistado – kiel ĝi cetere estas ankaŭ la bazo de la intencoj de d-ro Zamenhof – aŭ la politiko de konfrontado, de vetarmado, de forjetado de rimedoj ? Resume, la subteno de la ĝusta politiko do estas la decida influo de ĉiu homo por zorgeme trakti la vivomedion, por vivteni la ararbaron.

Ankaŭ en la raporto de la monda komisiono pri vivomedio kaj evoluo “Nia komuna estonteco” oni proponas ne izolite konsideri kaj solvi la nunajn ekologiajn problemojn, sed lige kun la problemoj de milito kaj paco, de malarmado kaj stabila evoluo de forigo de neprogresinteco kaj malriĉeco kaj de garantio de digna, sana kaj sendangera vivo sur la Tero.
Ĉu ne urĝas la tempo solvi la ekologiajn problemojn? Forigi detruitan arbaron, venenigitan grundon kaj malpurigitan grundakvon kaj eroziajn damaĝojn, restarigi la bazojn de nia vivo postulas multoblon kompare al la elspezoj por technologioj, kiuj zorgeme traktas la vivomedion. Pli multe da homoj devas uzi sian influon aŭ en komunumaj deputitaroj aŭ partioj aŭ en sindikataj organoj ktp., ke efektive okazu la hodiaŭ farebla. Al tio apartenas:

- oponi kontraŭ la malŝparo de tero de arbar-areoj; kontraŭ la malpurigo de aero, tero kaj akvo per laborejaj defalajoj, - Kompreneble ekzistas ĉe tio en profit-orientita socio egaj rezistoj.
- pledi por eduko al protektado de vivomedio. Estas ja konate, ke ankaŭ tre efikaj teknikaj vivomediaj instalaĵoj en la manoj de homoj, kiuj estas ekologie senklerigita kaj indiferenta, ne plenumas siajn funkciojn.
- subteni la agadojn de multaj sociaj fortoj – en GDR ekz. de Kukturligo, de Ĉambro de Tekniko, kaj de la Junulara Oraganizo – por la plibeligo kaj konservado de sana vivomedio.

Ĉerte vi atendas ankaŭ rekomendojn, kion oni povas fari por la arbaro tagon post tago. Antaŭe mi intencas ankoraŭ koncize skizi kelkaj paŝojn, kiujn la forstmastrumado mem faras en GDR:

- Kultivado de pli fumorezistaj arbospecoj
- Plivastigo de kultivado de foliarbo-specioj
- Pliigita farado de miksitaj arbareroj
- Plua farado de duetaĝaj arbareroj
- Bredado kaj kultivado de pli fumotoleremaj piceoj
- Grandarea sterkado de iom malfirmiĝintaj piceaj arbareoj en la Turingia Arbaro
- Instalo de mezur- kaj kontrolreto pri la arbarstato
- Disvolvo de kompulilapogita prognozomodelo pri la ŝirmo de la vivomedio.

Kio estas la ĉiutagaj eblecoj helpi fare de ĉiu unuopolo ?
Estas multnombro da eblecoj, ĉe kio ĉi tie efikas diverseco de interrilatoj. La imensa detruo de la tropika praarbaro favore de produktado de sojo kaj bovoj por la nutrado en la industriaj landoj estas nur ekzemplo.
Ni povas helpi la arbaron per:

- ŝparado de energio, precipe dum hejtado, kuirado kaj fridigado t.e. ekz. plibonigi la varmizoladon, varmigi nur la bezonatan akvokvanton
- subteno ĉe la reuzo de sekundaraj krudmaterialoj, do kolektado de papero, vitraj konservujoj kaj boteloj, tekstilajoj, plasto, metaloj ktp, kaj transdono al la respektiva komericisto. Ankaŭ aŭtovrakoj ne estu parto de arbaro kaj uzita oleo ne enfluu en la kanalan reton.
- sparema uzado de trinkakvo
- prefero de publikajtransportiloj
- tiamaniera veturado, kiu zorge traktas la vivomedion – tio estas ankaŭ vasta kampo, do la biciklo ĝis evito de veturado per plena gaso
- ŝparema uzado de nutrajoj
- kolektado de manĝaj restajoj por uzi illin kiel brutan nutraĵon
- prefero de boteloj kontraŭ garantiajo kompare al forĵet-ujoj dum aĉeto
- ŝparema uzado de rimedoj por lavado kaj purigado
- atento, ke venenoj k.s. oni ne donu en forverŝan pelvon – restojn de medikamentoj reprenas apotekoj
- apliko de farboj, kiuj zorge traktas la vivomedion
- konsiderinda rezigno en ĝardenoj pri plantprotektaj preparaĵoj precipe pri herbicidoj
- ne forbruligo de foliaro k.s. kompoŝtigeblaj substancoj
- zorgema traklado de la naturo, ekz. ne forlasi la vojojn dum la migrado, baniĝi nur ĉe aprobitaj plaĝoj, ne forjeti rubajon, rezigni pri skiado en alta neĝo, eviti bruon.

Tiel dum aĉetado, kuirado, purigado, lavado kpt. ĉiu povas fari politikon de sube kaj povas helpi, vivteni la arbaron.

**Aldonaĵo 2 al FI n-ro 21**

Ullrich, Ingward:
**Kelkaj rimarkoj pri la politikaj eventoj en la GDR**

En la lastaj 40 jaroj ni ĉiuj, GDR-anoj, estis kulturitaj fare de la politikaj kaj historiaj eventoj en nia lando kaj ĝia proksima ĉirkaŭaĵo. Kun amara aflikto ni devas ekkoni, ke oni gvidis nin eraran vojon. Nur iom post iom oni povas ĝuste ekkkoni kaj kompreni, kio okazis, kiel ni ĉiuj, kiel la popolo, estis superŝutitaj per mensogoj kaj trompoj, mensogitaj kaj perfortitaj fare de la gvidantaro de partio, kiu – ĉar ĝi posedis la potencon – kredis, ankaŭ posedi la rajton. Kiaj strukturoj ĉi tiuj ja estis, permesintaj la instalon de tiu korupta partia kaj ŝtata aristokrataro! Kiel kaj kiom oni fiuzis la socialismon en nia lando! Ĝi estis fiuzita fare de tiom da partiaj kaj ŝtataj funkciuloj de la plej malsupra ĝis la plej alta nivelo. Tio ne estis socialismo por la popolo, sed sole por la fifunkciuloj. La konfido al la Socialista Unuiĝinta Partio de Germanio kaj al la socialismo estas sufokita en la koroj de preskaŭ ĉiuj homoj por longa tempo, eble por ĉiam.

La malkovroj pri misuzo de aŭtoritato de la potenculoj grave trafis nin. Ni estas abrupte revokitaj el la utopioj de ĉiuflanke justa socialismo en la realon. Dum 40 jaroj oni marteladis nian kapon: “Tiel, kiel ni hodiaŭ laboras – tiel ni morgaŭ vivos!”, Nu, la popolo laboradis – kaj nun ĝi staras antaŭ sia domo kiel almozulo. Ni ĉiuj bedaŭras la tempon, kiujn ni perdis, serĉante bonan, sinceran socialismon., la tempon, kiu estis forrabita de ni fare de la malnova partia kaj ŝtata gvidantaro. Tiu ĉi tempo ne estas ripetebla. Ĝi estas fordonita vivo.

Multaj homoj silentis, tro multaj. Kaj tial ni devas senti nin kunkulpuloj. Pro timo kaj ĉar ni ne volis toleri, ke oni stampis nin “kantraŭrevoluciuloj”, ni volvis ĉirkaŭ ni vualon de silentado. Ĉu ne estintus pli honesta, esti rigardataj kiel kontraŭrevoluciuloj kontraŭ la kontrarevolucio de la fifunkciuloj? Tiam ni estintus fajrero de la estonta flamo – por citi Ŝatrov-on (“Diktaturo de l`konscienco”) – ĉar en la senhonoreco ni estus konservintaj nian honoron.

Nia ŝtato troviĝas en stato de fundamenta ŝanĝiĝo, troviĝas je la ekiro al novaj formoj de demokratia kunvivado. Tio bonas – kaj tiu procedo devas daŭri, se ni volas postvivi kiel GDR. Sed ni ne kredu, ke la fruktoj de demokratio kaj libera ekonomio estos donacataj al ni. Ĉion ni povos akiri nur per ne malkreskanta lukto kontraŭ la malnovan kaj per streĉa laboro por la nova.

Granda parto de forstuloj en GDR tre maltrankviliĝas, ĉar la nuntempa (ankoraŭ malnova) forsta gvindantaro (de ĉiuj gvidniveloj) ne naskas initiativojn. Tial la procedo de renovigo estas preskaŭ nulo. Certe, oni atendu profundajn ŝanĝojn nur post la sekretaj balotadoj en majo 1990, sed ĝis tiam ni devas bone prepari la grundon por la novaj semoj, ĉar “de nihilo nihil” (el nenio fariĝas nenio).

Por rapida demokratiigo ĝenerale kaj speciale en la sfero de la forstmastrumado estas plenumendaj la sekvaj ĉefaj postuloj:

1. Malkovro de misuzo de aŭtoritato de la potenculoj, de koruptado kaj pliaj maĥinacioj de la malnova partia kaj ŝtata aparato.
2. strikta realigo de demokratio, juro kaj justeco.

3. Radikala laj publika rezigno pri stalinistaj strukturoj.
4. Kontrolo de ĉiuj ŝtataj gvidantoj de ĉiuj niveloj kaj eksigo de kulpaj kaj nekapablaj kunlaborantoj.
5. Garantio de kundecida rajto ĉe ĉiuj gravaj decidoj.
6. Ŝanĝo de la organiza, produktada kaj administra strukuroj.
7. Garantio de ampleksa sendependeco kaj propra respondeco de la novaj forstaj entreprenaj unuoj.
8. Strikta realigo de ĉiuj mastrumaj faroj laŭ la principo de la daŭra forsta uzebleco. Tio necesigas:

   – la restrikton de arbfaligadoj konforme al la ekspluataĵa etato de la kuranta forstaranĝa periodo,
   – okazigon de vasta akordo inter lignoproduktado, ekologio kaj ekonomio,
   – la rapidan okupon de ĉiuj forstdistriktoj kaj –kantonoj per kvalifikitaj fakuloj.

9. Enkonduko de prestodependaj salajroj kaj forstaj rangoj kaj salajrogrupoj laŭ forsta eduko. Enkonduko de nova, simpla, superrigardebla popeca pagosistemo (nemanipulebla).
10. Garantio de plena sendependeco de la forstaj scienco kaj esploro.

La plej multaj homoj de nia lando en la pasintaj 40 jaroj donis siajn korpan kaj spiritan fortojn por la bonfarto de la popolo. Kaj ankaŭ eĉ estonte ni plue devas fari tion. Fari tion por nova, pli bona lando. Sed ni ankaŭ neniam forgesu, kio okazis – aŭ cio ripetiĝas!

**fake kaj lingve reviziis: Ingward Ullrich**